



## Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, la 7-a de Junio 2021

(hibrida - ĉeesta kaj zom-kunveno)

**Ĉeestantoj:** Jehoŝua Tilleman, Dror Gaon, Ŝlomo Ŝaĥar, Amri Wandel, Gabi Zeevi.

*Protokolo de la pasinta kunsido estis sendita al la estraranoj kaj jam enretigita.*

### **1. Raportoj**

- a) **Amri:** Sapir, nova lernantino, faris grafikaĵojn por la VK, kaj petis publikigi ilin.
- b) Amri akiris 500 NIS donacon por ELI en kortuma kompromiso.
- c) Amri renkontis d-ron Tsvi Sadan en Jerusalemo ĉe kurso pri ĥasidismo.

### **2. Landa Kunveno**

Ĝi okazos **mardon**, la 15-an de Junio, ekde la 17h00, en **Bejt WIZO**; la programo – ekde la 18h00. Amir Naor prezentos la registritajn kantojn de Israela Becker, kiu ne povos ĉeesti. Prelegoj: Amri kaj Luiza Carol. Oded Gilad akceptis prezidi la oficialaĵojn. Amri aranĝos modestan regalon.

### **3. Dratverejo**

**Amri** prezentas 4 proponojn de Ŝlomo pri administraj kompanioj – prezoj, servoj ktp. Ŝlomo telefonos por informiĝi plu.

### **4. Oficejo (Amri)**

Amri parolis kun adv. d-ro Modan, kiu pretigis la kontrakton (sendita al la Estraro). La vendisto ankoraŭ ŝuldas unu dokumenton. Ŝlomo telefonos al adv. Modan pri la subskribantoj. La Landa Kunveno devos aprobi subskribrajton al Ŝlomo kaj Amri.

### **5. IE 171**

**Amri** petis la presejestron, ke ĝi estu preta por la LK. Amri verkis la lastan paĝon pri niaj kongresaj informoj. La rimarkon NDLR necesas kompili aliel, aŭ meti la aŭtornomon en la kolofonon. Amri trovis 30 erarojn en sia artikolo en la laŭdire fina provlegita versio, kaj la korektoj daŭris ĝis kaj post la presado. Amri disdonos ĝin dum la LK.

### **6. Israela Kongreso**

Ĝi okazos inter la 7-a kaj la 9-a de Oktobro 2021, en **Bnej Dan**, Tel-Aviv. Nava kaj Amri informos dum la LK. **Amri** proponas publikigi 1/8-paĝan koloran anoncon en la bulteno E-o sur la dorsopaĝo. **Unuanime akceptita**.

**La venonta kunsido:** la 5-an de Julio 2021, je la 20h00.

Protokolis: *Gabi Zeevi*; aldonoj kaj korektoj de *Amri Wandel*